

L KATOLIKA SENTO

2 rm

4



U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE



KATOLIKA SENTO

**BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

Anno 51° - 1972

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964



KATOLIKA SENTO

51a Jaro

n° 4

Aprilo 1972

P A S K O

La famo kuris fulme tra l' popolo:
-Alvenas Reĝo glora kaj arkana,
la Reĝo de la paco, de l'konsolo -
"Al la altega Diofil' hosana!"

L'aklamoj ĉesis. Jen Iskarioto...
Sur kruco pendas Dia la Ŝafido.
La tero tremis, nigras la Golgoto...
Li mortis... Plenumiĝis la perfido.

L'aero mutas dum patrino ploras
kun koro trapikita de l' funebro.
Sur monton, kiu vidis kaj doloras,
falas de l' trista nokto la tenebro.

Matenkrepuskas je la tago tria.
De l' monto disen flugas voĉo tuja,
l' animon konsolanta, sensacia:
"Jesuo reviviĝis, haleluja!"

Romo, 24-3-1972

Luigi Minnaja

.....

U.E.C.I. deziras al ĉiuj siaj membroj kaj simpatiantoj sanktan Paskon en la graco de Kristo savanto kaj en la ĝojo de la reviviĝo.



EL LA KRUCO ESPERO DE AMO KAJ PACO

(Parolado de la Papo post la "Krucvojo" de li prezidanta ĉe la Koloseo la Sanktan Vendredon, 31-ande marto 1972-a)

Nun, por konkludi ĉi tiun "Krucvojon", ĉi tiun itineron de doloro, kun kiu ni akompanis Jesuon, noma - tan Kristo, mesia Reĝo de la elektita popolo, al la eŝafodo kruela kaj malnobla de la Krucvojo, al la morto senkulpa kaj senkompata, nun, kiam ni alvenis al Lia tombo, preĝante kaj plorante, kaj restas mutaj, kaj kvaŝaŭ subpremitaj de ĉi tiu tragedio, tipa de la homa sufero, de la homa maljusteco kaj de la dia mizerikordo, nun ni aŭskultu Lin, Jesuon, la mortinton, la mortigiton, la entombigiton, se Li havus ankoraŭ vorton por diri al ni: ĉu lamenton, proteston, kondamnon, anate

mon? Aŭ ĉu rememoron, konsolon, eĥon de tiu lia voĉo grava kaj dolĉa, tiom homa kaj profeta, kiun ni aŭskultis en lia mesaĝo al la homaro, en lia Evangelio?

Jes, vi Fratoj ĉiuj, ĉi tie kaj en la tuta mondo, kiuj streĉas la orelon nun al la silento morta kaj mistera de la tombo de Kristo; jes, Li parolas ankoraŭ. Li estis tion certiginta: "Forpasos la ĉielo kaj la tero, sed miaj paroloj ne forpasos".

Kiuj estas Liaj senmortaj paroloj?

Aŭskultu: "Venu al mi vi ĉiuj, kiuj estas lacaj kaj subpremataj, kaj Mi konsolos vin!"

Ĉu estas Lia ĉi tiu parolo? Jes, ĝi estas parolo de Kristo.

Ĉu estas vera ĉi tiu parolo? Jes, ĝi estas vera!

Kaj ĉu ĝi estas ebla? Ĉu ĝi ne estas iluzio? Ĉu ĝi ne estas trompo al la homa doloro? Ĉu moko, narkotaĵo? Kiel ĝi povas esti vera?

Jen: ni komencu aŭskulti ĝian eĥon resoni en ni aj animoj. Ĝi estas parolo eldirita por ni malfeliĉuloj. Ni homoj estas ĉiuj malfeliĉaj. Kaj tiu, kiu inter ni estas plej malfeliĉa, plej bone povas kompreni ĝin, kva^{za} ŝi ĝi estus adresita al li mem.

La Krucumito parolas al Vi, homo, kiu suferas, al Vi, homo ŝargita de la penoj, de la ĉagrenoj, de la mizeroj de via vivo. Li parolas al Vi, malsanulo; al Vi, mizerulo; al Vi, handicapito. Li parolas al Vi, homo ploranta; al Vi, homo, kiu eble ridas por ne blasfemi; al Vi, homo, kiu silentas ĉe l' rando de la malspero.

Kiu estas Tiu, kiu parolas al Vi, kaj Vin vokas?

Li estas la Homo de la doloro; Tiu, kiukonas la suferadon.

Minimume, Kristo estas Via kolego ; Li estas Via amiko. Ĉi tio ne estas ja konsolo, kiu elprenas el la koro la aflikton plej malbonan, tiun de la forlaso kaj de la soleco, tiun de la malespero? Kristo estas kun Vi, suferas kun Vi.

Kaj aŭskultu Lin ankoraŭ: ĉu Kristo ne identiĝis kun Vi, kia ajn estas Via malfeliĉo? La malsato, la malriĉeco, la malsano, eĉ la krimeco, por kompatigi tiumaniere la korojn bonajn, kaj grandanimajn, kiuj ankoraŭ ekzistas, kaj inciti ilin veni helpe al Vi, survestita je siaj homaj-diaj aspektoj. Kia pligranda digno povis esti al Vi donita?

Ĉu la homoj venos tiel helpe al Vi? Mi esperas tion, sed ne scias kun certeco; tamen, kia stimulilo pli granda ol ĉi tiu povis esti donita al la homa solida reco, al la boneco, kiu ne humiliĝas la malfeliĉulon, sed humiliĝas antaŭ li? Komprenu almenaŭ tion, homo, kiu suferas: neniu pli ol Kristo defendis kun pli da justeco vian doloron, vian bezonon, vian malsuperecon, vian mizeron. La tuta moderna sociologio, kiu celas al la liberigo de la homo subpremata, al lia rehonorigo, al lia egaleco, devas ĉerpi, verŝajne eĉ sen konscie, el la depostulo de la rajto, pli ol civila, starigita de Kristo, kiu igis fratoj ĉiujn homojn elacetaŭte ilin el la egoismo (kiu igas ilin lupoj unuj kontraŭ aliaj) en la amo kaj en la paco.

Kaj aŭskultu fine la lastan revelacion konsolan, ho homo torturata de la granda problemo pri la kialo de via suferado. Aŭskultu kion diras Jesuo krucumita: "Beataj - beataj, ĉu vi komprenas? ne estas moko! - beataj tiuj, kiuj ploras, ĉar ili estos konsolataj!" kaj al la rabisto, kiu, krucumita ankaŭ li, agonias apude, Li faras la grandan promeson: "Hodiaŭ vi estos kun mi en paradizo!" Ĉu vi komprenas? La doloro - aŭskultu - ne estas plu senutila! ne estas plu

nur disperdo kaj korŝiro de la vivo. Kristo transformis ĝin en aĉetmonon, en prezon de elaĉeto, en garantiaĵon de reviviĝo kaj de vivo. Li donis sekretan sencon kaj potencon povon al la homa suferado, kondiĉe ke ĝi estas asociita al lia pasiono. Konsolata de Kristo, ho homo suferanta, vi povas esti eĉ konsolanto!

Fratoj, ĉi tio ne estas vertiĝo, kiu atakas nin je la fino de la dramo de la Kalvario; ĝi ne estas frenezo. Ĝi estas la balzamo de la "Via Crucis", kiu ne estas io alia - se laŭirata kun Kristo - ol la "via lucis", la vojo al la lumo kaj al la lasta kaj vera vivo, tiu de la reviviĝo.

Tiel estu por ni, kaj por la tuta homaro suferanta.

trad. L.M.

.....

PASTRO ALEKSANDRO DOMBROWSKI, unua katolika poeto en Esperanto.

Ne ofte renkontiĝas en unu sama persono amo al la scienco kaj al la beletro. La litova profesoro prelato Aleksandro Dombrowski apartenas al tiu ne multenombra kategorio: li estis granda matematikisto kaj ne malpli granda beletristo. Por ni esperantistoj li reprezentas elstaran figuron laŭ la historia kaj literatura vidpunktoj.

Aleksandro Dombrowski naskiĝis de vilaĝanaj gepatroj la 27-an de aŭgusto 1860-a en Kuroniai (centra Litovujo). Li verŝajne estis la unua persono, kiu lernis la internacian lingvon pere de libroj. En 1887-a, estante en Peterburgo por perfektigi en Teologio, li legis en ĵurnalo sciigon pri la apero de nova lingvo. Li tuj mendis la libreton kaj, post dutaga studado, sen-

dis leteron esperantlingve al D-ro Zamenhof en Varsovio. Do, ne pasis eĉ du semajnoj post la apero de "Lingvo Internacia", kaj prelato Dombrowski jam estis esperantisto. Fervora entuziasmo ekkaptis lian junan koron.

Li estis unu el la unuaj poemverkistoj en Esperanto kaj la unua katolika poeto.

En sia longa, multforma esperantista kariero - li mortis la 19-an de februaro 1938-a - li verkis sen nombrajn artikolojn kaj plurajn poeziaĵojn plej parte katolikajn. Du el ili havas specialan gravecon por la historio de la lingvo kaj de la movado. Ili estas du himnoj: "Estu! estu!" dediĉita al lia Plej Sankta Moŝto Leono XIII okaze de lia 50-jara episkopa jubileo, kaj la "Himno" dediĉita al la Internacia Esperantista Kongresanaro en Boulogne-sur-mer. En ambaŭ forte vibras senfina amo al Dio kaj arda aspiro al homa interfratiĝo.

"Estu! estu!", verkita la 19-an de februaro 1893-a kaj aperinta kun la franca traduko en la preĝareto por katolikoj de de-Beaufront, estis la unua katolika Esperanta poemeto, kaj la unua esperantlingva verko kantita en preĝejo.

Pri ĝi la aŭtoro skribis al abato Peltier, redaktoro de "Espero, Katolika", la 12-an de majo 1902-a: "Esperanto efektive estis uzita unuafoje en katolika preĝejo. Tio ĉi okazis (se mi ne eraras) en la jaro 1896-a. Oni festadis tiam la aperon de diservo en la novekonstruita preĝejo en Smolensk. Nature tieaj katolikoj volis ĉiu laŭ sia opinio kaj religia fervoro fari tiun ĉi feston plejeble solena. Ĉe tiu ĉi okazo la Smolenskaj esperantistoj deziris ankaŭ ekmontri siajn religiajn sentojn. Tial, preninte el la Beaufronta preĝareto mian poezion "Estu! estu!" ili verkigis muzikon por ĝi, kaj en la dirita solena tago kantis ĝin ĥore dum la

meso." Jen la du unuaj strofoj de tiu poeziaĵo:

Laŭdu vi Dion, ĉiuj gentoj teraj,
Ĉiuj popoloj, laŭdu la Sinjoron!
Levu jam supren feran vian koron,
Rekonu, ke vi estas fratoj veraj.

Unu vi havas civilizacion,
Teron, aeron havas ja komunan,
Super la kapoj unu globon sunan,
En la ĉielo - unu patron - Dion.

Impona estis la partopreno de la katolikaj espe-
rantistoj en la Unua Universala Kongreso de Esperanto
okazinta en aŭgusto de 1905-a en Boulogne-sur-mer.
Al tio tre helpis la propaganda agado de multaj eminen
tuloj kaj precipe de de-Beaufront, Michaux kaj abato
Peltier, ĉi-lastata fervora iniciatinto de la katolika Es-
peranta movado. Unu el la du flagoj, flirtintaj dum tiu
kongreso kaj subskribitaj de la aŭtoro de Esperanto,
burĝonis kaj ekfloris en katolika domo, ĉar ĝi estis ku
drita, en monakinejo, de la filino de s-ro Michaux.

Grava, granda okazaĵo la Unua Kongreso!

La notoj dolĉaj kaj sentimentalaj de la unua muziko
de la esperantista himno "La espero", komponita de
le eminenta samideano Adelsköld, resonas ĉarme kaj
milde en la vasta salono. Por la lasta fojo... Nova te
mpo, nova modo... nova periodo ekiras: Esperanto for
lasas la etajn studoĉambrojn kaj la salonojn, eliras sur
la placojn, sur la stratojn kaj komencas sian publikan,
vere internacian marŝon por disvastiĝi tra la mondo ;
akompanas de nun tiun marŝon la impeta kaj iom revo-
luciema muziko de s-ro De Ménil. Samtempe en la pre
ĝejo de S.ta Nikolao pastro Peltier unuafoje celebras
meson antaŭ pluraj centoj da katolikaj esperantistoj; la
blinda orgenisto ludas alian himnon, kiu same estas a-

miga kaj frateca, la himnon verkitan de prelato Dombrowski.

Dum pluraj jaroj ĝi estis konsiderata kiel himno de la katolikaj esperantistoj kaj ofte kantata precipe okaze de kongresoj. La belan kaj solenan muzikon de tiu himno komponis s-ino Josée Guivy, kiu mem dum la meso ĉarme kaj pie kantis la sinsekvajn strofojn.

El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj,
Ni kunvenintaj Vin adoras, Di'!
Al vi sin turnas niaj piaj sentoj,
Kaj nia kanto sonas nur al Vi!

Vi - nia Patro, ni ja - Viaj idoj
Kaj reciproke - fratoj al ni mem;
Venu do amo, estu for dividoj,
Venu frateco kaj pereu prem'!

Per la donita al ni krea forto,
Via, Kreinto, estas ni imag'!
Vi kreis mondon tutan per la Vorto,
Ni Vin imitas per la Vort' kaj ag'.

De ni kreitaj estas art', scienco,
Nun celas mondon ni de ideal';
Tre malfacila estis krekomeno,
Hodiaŭ kreas ni en granda skal'.

Laŭ Via diro: ekposedu teron!

Ni ĝin okupis kaj posedas nun;
Transnaĝas marojn, sondas atmosferon,
Kaj ĉie loĝas, kie brilas sun'.

Al ni obeas fortoj de naturo ;
 Al ni jam servas elektrec', vapor' ;
 Nur peka sekvo de Babela turo
 Nin malhelpadis en la krelabor'.

Sed jen ĉi tiu baro forigita :
 Homon kompreni povas ĉiu hom',
 Ĉar estas lingva komprenil' kreita
 Kaj ĉie sonas ĝia bela nom'.

Ĝin al Vi, Dio, ni kun preĝ' oferas, -
 Volu el alta beni ĝin ĉiel' !
 Kun ĝia helpo baldaŭ, ni esperas,
 Plej sankta estos atingita cel' :

Sub la konduko civilizacia
 Kuniĝos granda de nacioj ar' ;
 Kaj - antaŭsigno de la Regno Dia -
 Aperos unu jam ĉiuhomar'.

Kaj ĝi ne estos plu estaĵo muta,
 Ĉar propran lingvon havas kun konsci' ;
 Kaj tiun voĉon de l' homaro tuta
 Atentos reĝoj kaj ĉiu naci' ...

Ho, venu tiu hor' de unueco !
 Rompon, dividon amas nur satan' ...
 Patro, ni preĝas Vin pri la frateco,
 Nian laboron benu Via man' ! ...

Alia poemeto de Dombrowski havas specialan gravecon precipe post la sanktuligo de Papo Pio X. Ĝi estas titolita "Al lia plej sankta Moŝto Papo Pio X", kaj aperis en la unua numero de "Espero Katolika" en oktobro 1903-a, okaze de la elekto de tiu Papo. Grandan ĝojon sentis en sia koro la verkinto, kiam en 1906-a li eksciis, ke la Papo mem legis la poemeton, al li prezentitan de monsinjoro Giambene.

Luigi Minnaja

MOZAIKA PANELO EN NAZARETO honore al nia Sinjorino de la Espero. Sekve de la alvoko aperinta en la 3a numero de nia bulteno, ni ricevis la unuajn monoferojn. Niaflanke ni promesis premii ĉiun, kiu sendos por la mozaiko almenaŭ 10.000 lirojn, per bildkarto de nia Sinjorino de la Espero: valorega memoraĵo benita de la papo en S. Petro, okaze de la solena inaŭguro de la bildo; kun vatikana poŝtmarko kaj poŝta stampo de la sama neforgesebla tago. Jen la unuaj donacintoj:

"Centro Esperantista Cattolico Romano:	40.000
Norma Dell'Aringa - Mantova	10.000
P. Giacinto Jacobitti - Romo	10.000
Luigi Minnaja - Romo	20.000
Sac. Bruno Benini - Cesena (FO)	5.000
Sac. Ippolito Pellis - Fogliano (GO)	10.000
N.N. - Romo	10.000
P. Carlo Cecchitelli - Romo	10.000

La "INTERNACIA KATOLIKA INFORMEJO" (I.K.I.) komunikas, ke la jam longa listo da eldonoj daŭre kreskas, kvankam kun la malfacilaĵoj de la preskostoj. En la pasinta jaro aperis la numeroj 1-3 de Vojo, Vero, Vivo, kun valora enhavo: "Interkomunio"; "La protekto de la vivo" de kard. Villot; completa bibliografio de oficialaj dokumentoj en Esperanto, kaj la encikliko "Humanae vitae". Baldaŭ aperos la encikliko "Misterium fidei". Krome, estas anoncita nova kajero de la Nova Testamento, la kajero 8, kun pluraj leteroj de S. Paŭlo; dum en preparo estas la Evangelio laŭ Johano.

ROMA ESPERANTA VOĈO

n^o 104

PROF. ELIO MIGLIORINI SEPDEKJARA. - Elio Migliorini naskiĝis en Rovigo la 9-an de marto 1902-a. Universitata profesoro pri geografio, li ĵus atingis la aĝon de 70 jaroj.

Redaktoro dum dudek jaroj de la Bulteno de la Itala Geografia Societo, por ĝi verkis multajn artikolojn kaj recenzojn. Ĉirkaŭ la jaro 1932-a li komencis sian intensan kaj valoran sciencan produktadon. Post la dua mondmilito aparte fekundaj estis la jaroj de lia profesoreco ĉe la Napola kaj Roma Universitatoj: li tiam aperigis multenombrajn traktaĵojn, jen ĝeneralajn pri la homo kaj ĝiaj laboroj, jen specialajn pri diversaj regionoj de la terglobo. Ĉe la Geografiaj Kongresoj, en kiuj li aktive partoprenas jam de pluraj jardekoj, lia ĉeesto sin sentigas pro interesaj proponoj kaj gravaj referaĵoj. Lia rimarkinda agado meritigis al li la membrecon ĉe la Nacia Akademio de "Lincei", kiu estas la plej alta itala institucio, rezervita al la plej talentaj kaj famaj kleruloj en la diversaj sciencaj branĉoj.

Prof. Migliorini ĉiam dankeme reliefigis, ke al lia scienca aktiveco multe kontribuis la kono de Esperanto, kiu ebligas al li intime kontakti kun loĝantoj de la diversaj vizitataj landoj. La Internacian Lingvon li eklernis, kiam li estis 12jara knabo, fervore sekvante la spurojn de sia pli aĝa frato, Bruno, tiam universitata studento kaj poste fama universitata profesoro pri historio de la itala lingvo. Al Esperanto Elio Migliorini kontribuis per multaj artikoloj en revuoj, per paroladoj, per publikigo de riĉenhava legolibro, kiu, kun sin

sekvaj ampleksigoj kaj aktualigoj, jam atingis la kvinan eldonon. Delegito de UEA en Romo jam ekde 1922-a, kaj ekde la sama jaro membro de la Itala Instituto de Esperanto, li gvidis plurajn kursojn. Luigi Minnaja, unu el liaj plej diligentaj disĉiploj, dum intima kunveno de gesamideanoj okaze de la fermo de la Semajno de Internacia Amikeco, volis omaĝi al prof. Migliorini pro lia 70-jariĝo per sentoplana poemeto, en kiu kun dolĉa nostalgio li memorigas la gajajn vesperojn ĉe la Greka Kafejo - la esperantista kunvenejo inter la du mondmilitoj - kaj la frekventadon de Esperanto-kurso en januaro 1926-an ĉe la Popola Universitato.

Esprimante niavice al nia eminenta membro la plej sincerajn gratulojn pro la atingita aĝo kaj la plej varmajn bondezirojn por vivo ankoraŭ longa, sana kaj vigle agema, ni prezentas al la legantoj la poemeton.

AL ELIO MIGLIORINI SEPDEKJARA

Defilas jaroj, falas en forgeson,
sed restas ĉize bildoj en la menso,
signantaj tre skrupule la progreson
de l' aĝo ĉe la koro, ĉe la penso.

Kaj dum sen halt' galopas kalendaro,
laŭgrade kreskas, kun la ritmo sama,
de geograf' l' agado kaj verkaro,
kaj vi fariĝas pli elstare fama.

Ĉu foje tamen eĥas rememoro
pri l' verdaj tempoj de l' junaĝo veka:
viglad' por Esperanto kun fervoro,
vesperoj gajaj ĉe l' "Kafejo Greka"?

Estis l' aŭror' de l' jaro dudeksesa;
 ĉe l' Universitato de l' Popolo
 vi min instruis - temo interesa -
 pri la strukturo de la novparolo.

Meze de l' vastaj sentoj de admiro,
 al vi, hodiaŭ, Elio, sepdekjara,
 kun la plej varma, kora bondeziro
 alvenu mia danko, Majstro kara.

Luigi Minnaja

.....

ALIĜIS AL UECI-CECR: Romo: G. Kellner; J. Koritkowski; P. Urbajtis; Aleksandrio: A. Bronchi; Bologna: J. Albertazzi; E.-Grupo; Catania: G. Bruno; Fogliano (UD): I. Pellis; Ĝenovo: F. Bianchi; Grosseto: C. Cardoselli; M. Casoli; Livorno: L. Neri Lami; Mantova: G. Zacché; L. Zacché; S. Zacché; L. Lodi Rizzi; L. Bianchi; T. Tesini; F. Zanetti; L. Freddi; Massa: C. Dazzini; Messina: F. Minuccio; Milano: S. Giacchino; Mirandola (MO): E.-Grupo; Pisa: A. Sordi; Pistoia: U. Stoppoloni; Reggio Emilia: A. Jemmi; San Pancrazio (RA): A. Duranti; Tirolo (BZ): F. Knoflach; Trieste: F. Polidori Grilli; Udine: A. Blasoni; Uliveto T. (PI): F. Franchi; Aŭstrujo: E. Macheiner; L. Oberlechner; Ĉeĥoslovakio: A. Kulikovà; Francujo: J. P. Trelluyer; Hispanujo: M. Perez; M. Casanoves; J. Claramunt; M. Martinez; Jugoslavio: J. Oreb; F. Stricki; Ivić Jaklin; Nederlando: S. P. Smits; E. Paesmans; H. Wannenmakers; D. De Boer; T. Durenkamp. Entute: 388.

BONFARA KASO: £. 4.000: I. Angeletti; 3.000: R. Galeotti; E. Sias; 2.000: O. Sias; 1.000: D. Libutti. Post la kutima paska donaco al du maljunaj s-aninoj (20.000) restas: £. 55.000. Al ĉiuj bonfarintoj koran dankon!

DISDONO DE UNUAGRADAJ DIPLOMOJ. Dum la kunveno de la 5a de marto, por solene fermi la Semajnon de Internacia Amikeco, la direktorino de la Roma katedro de la Itala Instituto de Esperanto, prof. Carolina Minnaja, disdonis la diplomojn al la jenaj frekventintoj de unuagrada kurso, gvidata de d-ro Menabene, kiuj brile superis la koncernan ekzamenon: Baldi Renata, Biani Aldo, Carpitella Bovio, Casagrande Antonella, Chiappetti Francesco, Coppola Giovanni, D'Ascanio Remo, De Angelis Roberto, Donatiello Elio, Libutti Domenico, Marianetti Manuela, Minore Valeria, Patrizi Lea, Peccirillo Antonietta, Reitano Pietro, Rescigno Sebastiano, Tauci Mauro, Di Tocco Vera, Tosi Gigliola, Tosi Paolo, Vecchioni Giuseppe, Venezia Francesca. Gratulojn kaj bondezirojn de plia progreso al ĉiuj!

Sam-ino Lucia Terrazzani, ne povante danki al ĉiuj, kiuj dum ŝia malbona farto bondeziris al ŝi, intencas tion fari per ĉi tiu anonco.

El la Katolika Eklezio

GRAVA VATIKANA DOKUMENTO pri la kredo je la enkarniĝo de Kristo kaj la dia Triunuo. "Estas necese - tiel komenciĝas la dokumento - ke la misteroj de la enkarniĝinta Dio kaj de la sankta Triunuo, kiuj apartenas al la ĉefaj veroj de la revelacio, lumigu per la pureco de sia vero la vivon de la kristanoj. Kaj, ĉar kelkaj nia tempaj eraroj klopodis renversi ĉi tiujn misterojn, la sankta kongregacio por kredodoktrino decidis rememorigi kaj defendi la kredon je ili. Unue la katolikankredon je la enkarniĝinta Dio. Oni realvokas al la kredkonfeso ordonita de la Kalcedona koncilio, pri la Filo de Dio generata de la Patro de eterne kaj naskiĝinta de la

virgulino Maria laŭ sia homa naturo en la tempo. La sama Koncilio instruis, ke en la unika persono de nia savanto kuniĝas du naturoj, la dia kaj la homa sen konfu-zo, sen aliĝo, sen disiĝo. Tiel ankaŭ la Koncilio Late-rana IV pri la unika Filo de Dio, sameterna kun la Pa-tro, kiu fariĝis vera homo, kaj estas unu persono en du naturoj. - Kaj tuj oni venas al la kondamno de la era-roj: "Rekte opoziciaj al ĉi tiu kredo estas la opinioj, laŭ kiuj ne estis revelaciite kaj ne estas eble scii, en la dia mistero, ĉu la Filo de Dio estas distinga aŭ ne de eterne, de la Patro kaj de la Sankta Spirito; kaj an-kaŭ la opinioj, laŭ kiuj ne estas necese kredi pri unika persono en Jesuo Kristo, naskiĝinta antaŭ la jarcentoj laŭ la dia naturo kaj en la tempo laŭ la homa naturo pe-re de la virgulino Maria; kaj fine la opinio, laŭ kiu la homa naturo de Kristo ne estis kunigita kun la eterna persono de la Filo de Dio, sed ke li estas nur homa per-sono; kaj sekve, ke la mistero de Kristo konsistas nur en tio, ke Dio manifestiĝis laŭ elstara maniero en la ho-ma persono de Jesuo". Tiuj, kiuj tiel opinias, daŭras la deklaro, "estas malproksimaj de la vera kredo, eĉ kiam ili asertas, ke la elstare unika ĉeesto de Dio en Jesuo faras, ke li estas la plej alta esprimo de la dia revelacio; kaj ili ne alvenas al la vera kredo je la die-co de Kristo, eĉ kiam ili aldonas, ke Jesuo povas esti nomata Dio, ĉar en lia naturo, kiu laŭ ili estas nur ho-ma, Dio plene ĉeestas." Kompreneble, kiam oni forla-sas la misteron de la dia kaj eterna persono de Kristo, ankaŭ la vero pri la Tre Sankta Triunuo detruigas, kaj kun ĝi la vero pri la Sankta Spirito. Ĉi tie la dokumen-to citas la atestojn de la evangeliistoj Mateo kaj Joha-no, kaj la instruadon de la tuta eklezio, precipe la IV Lateranan Koncilion, kiam ĝi ordonis, ke oni kreu kaj proklamu, ke "nur unu estas la vera Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito: tri personoj, unu nura esenco: la

Patro, kiu de neniŭ devenas, la Filo, kiu devenas nur de la Patro, kaj la Sankta Spirito, kiu eliras de ambaŭ, ĉiam sen komenco kaj sen fino". Pro tio "estas kontraŭa al la katolika kredo la opinio, laŭ kiu la revelacio permesas al ni dubon pri la eterneco de la Triunuo, kaj aparte pri la eterna ekzisto de la Sankta Spirito, kiel persono distinga, en Dio, de la Patro kaj de la Filo". Vere estas, rimarkas la deklaro, ke la "mistero de la Tre Sankta Triunuo estis revelaciita al ni en la kadro de nia savo, precipe pere de Kristo, kiu estis sendita en la mondon per la volo de la Patro, kaj kiu kun la Patro sendas al la dia popolo la Sanktan vivigan Spiriton". Sed per ĉi tiu revelacio estis donita al la kredantaro "ankaŭ la sciigo pri la intima vivo de Dio, en kiu "la Patro, kiu generas, la Filo generata kaj la Sankta Spirito, kiu de ambaŭ eliras, estas el la sama substanco, egalaj, ĉiopovaj kaj eternaj". La misteroj de la enkarniĝo kaj de la Sankta Triunuo devas do esti fidele gardataj. La eklezio klopodos por ke, laŭ la novaj pensmanieroj de la homoj, tiuj misteroj estu enprofundigataj per la kontemplado de la kredo kaj la priserĉado de teologoj, kaj pli klarigataj en taŭga maniero"; tamen oni devas zorgi, ke neniam ili estu prezentataj laŭ senco **malsama**, ol tiu kiun la eklezio sentas kaj sentis". La senmakula vero de ĉi tiuj misteroj estas treege grava, ne nur pro la tuta revelacio de Kristo (ili estas tiel en nukleitaj en ĝi, ke "se ili estus aliigataj, pereus ankaŭ la tuta kredotrezoro") sed por la kristana vivo mem: "unu ĉar nenio manifestas tiel klare al ni la amon de Dio, al kio la tuta vivo de la kristanoj devas esti respondado, kiel la enkarniĝo de la Filo de Dio, nia savanto; - due, ĉar "la homoj pere de Kristo, la enkarniĝinta Vorto de Dio, ricevas supernaturan vivon de la Patro pere de la Sankta Spirito, kaj partoprenas en la dia naturo". Konklude, estas devo de la paŝtistoj "postuli u-

nuecon pri kredkonfeso de sia popolo kaj ĉefe de tiuj, kiuj pro la speciala tasko al ili komisiita, instruas la religiajn doktrinojn aŭ predikas la dian vorton", por ke neniam ili malproksimiĝu de la sana doktrino kaj neniam transdonu ĝin "difektitan kaj ne integran". Kristanoj - kaj ĉefe teologoj, pro sia grava ofico kaj necesa servo al la eklezio - devas fidele gardi ĉi tiujn misterojn. Plue, la filoj de la eklezio devas doni sian plenan konsenton al la integra doktrino de la eklezio, sub la gvidado de siaj paŝtistoj kaj de la paŝtisto de la universala eklezio".

APERIS LA NOVA RITARO por la kristana inicado de adoltoj, kiu priskribas kaj fiksas la etapojn, per kiuj la eklezio plenumas la preparon de plenkreskuloj al la sakramentoj de bapto, konfirmo kaj eŭkaristio. Preparo, kiu kutime disvolviĝos per katekumenado dum kelkaj jaroj, tri aŭ kvar. Tio konsistos pri laŭgrada partopreno en la vivo de kristana komunumo pere de taŭga katekizado kaj liturgiaj celebroy, kiuj esprimas la dian agadon en la homa vivo. La rito, kvankam prenas sian inspiron el la katekumenado de la unuaj jarcentoj, tamen proponas adaptiĝojn al niaj tempoj kaj al la plej diversaj tradicioj kaj kulturoj. Oni jam eksperimentis ĝin en diversaj misilandoj (Votalando, Kameruno, Japanujo) kaj en nacioj kun nova kaj malnova kristaneco (Kanado, Francujo, Belgujo). La ritaro fariĝos deviga post kiam la episkopaj konferencoj estos adaptintaj ĝin al la respektivaj lokaj situacioj. Ĉefaj karakteroj de la ritaro estas: klopodo atingi plian aŭtentikecon en la kristana maturiĝo kaj en vivo laŭ kredo; poste la laŭgrada progreso de komuneca vivo per la evangelia spirito, ne plu nur individue, sed helpe de la tuta kristanaro. Tio ebligos siavice ankaŭ reciprokecon, stimulant la alian komunumon al pli fervora konduto. Fine la plej granda

elasteco, kio permesos al ĝi ĉian adaptiĝon, el afrika lando ĝis civilizita urbo de okcidentaj ŝtatoj. Inter la ritoj estas antaŭvidita ankaŭ la merga baptito, laŭ la cirkonstancoj kaj kun la necesa prudento. Ne estas devigaj kristanaj nomoj: pri tiuj estas antaŭvidita granda elektebleco. Oni nur petas, ke ili ne estu insultaj aŭ provokemaj antaŭ la kristana sento. Ekzistas ankaŭ ia akceptoformo por simpatiantoj, kiuj povas partopreni kelkmaniere en la vivo de la kristana komunumo, kvankam ili ne estas baptitaj. Tio koncernas precipe kelkajn landojn, kiel Japanujon, kie rezervoj pri kredo estas pli fortaj, aŭ kie ekzistas ankoraŭ poligamio.

EL LA KOLEKTO DE STATISTIKOJ publikita de la Ŝtata Sekretariejo, je la unua fojo post la starigo de la Centra Oficejo por statistiko de la eklezio, ni ĉerpas ĉi tiujn informojn: La katolikoj baptitaj estas preskaŭ 633 milionoj en la tuta mondo kaj reprezentas la 18 procentojn de la tuta homaro, kiun oni kalkulas al preskaŭ 3593 milionoj da animoj. La procento de la katolikoj estas tre diversa laŭ la kontinentoj: 55 procentoj en la du Amerikoj, 38 en Eŭropo, 23 en Oceanio, 11 en Afriko, ĝis minimumo, ĉirkaŭ du procentoj, en Azio. En la tuta mondo ekzistas 2.278 ekleziaj distriktoj, tio estas rezidejoj de patriarkoj, ĉefepiskopoj kaj episkopoj, krom prelatujoj, vikariujoj, apostolaj prefektujoj, ktp. El tiuj distriktoj 2.148 apartenas al la latina rito, kaj 130 al la orienta. La parokoj estas ĉirkaŭ 19.000, sed pli ol kvinono el ili estas bedaŭrinde sen parokestro, ĉar malmultaj estas la "laboristoj de la vitejo". En Eŭropo el 132.251 ekzistantaj parokoj, 35.802, t.e. 27 procentoj estas sen parokestro. Ekzistas ankaŭ paŝtistaj centroj, aŭ kvazaŭ parokoj kaj misiaj stacioj, kiuj estas 83.000: preskaŭ 80 procentoj el ĉi tiuj ne havas rezidan pastron. Rezidaj sacerdotoj de la diocezo kaj regu

lara klerikaro, je servo de la diocezoj en la tuta mondo, estas 425.060. Aldonante al tiuj la diakonojn, la laikaj religiuloj kaj la votintaj religiulinoj, oni atingas la nombron de unu miliono kaj duono da personoj, kiuj sin dediĉas en la katolika eklezio al la servo de la animoj. El cent sacerdotoj oni kalkulas, ke 45 estas malpli ol 45-jaraj; 41 iras de 46 al 65 jaroj; 14 de 66 al pli granda aĝo. En la 1969a ordiniĝis 5.156 diocezaĵaj sacerdotoj, kaj mortis 5.014. Pro tio la perdoj pro morto estus entute kompensitaj; sed en la sama jaro bedaŭrinde okazis 1780 ekxiĝoj, el kiuj 727 en Eŭropo, 658 en la norda kaj 207 en la suda Ameriko. La novaj sacerdotoj el la regulara klerikaro estis 3.407. Sed ankaŭ en ĉi tiu vico estiĝis ekxiĝoj. Dum sep jaroj, de la 1964a ĝis la 1970a la ekxiĝoj estis 6.920 ĉe la dioceza, 6.520 ĉe la regulara klerikaro; entute 13.440: multe malpli ol la fantaziaj nombroj liveritaj de ne seriozaj gazetoj. Por mencio pri la kandidatoj al sacerdoteco: komence de la 1970a la seminarianoj registritaj ĉe mezgradaj lernejoj kaj ĉe filozofiaj kaj teologiaj kursoj, el ambaŭ vicoj de la pastraro estis 286.373, respondantaj al 69 procentoj de la ekzistantaj sacerdotoj. El la sama volumo oni povas informiĝi, ke en Italujo la katolikoj estas la okdek ok procentoj de la loĝantaro. Ke la ekleziaj distriktoj estas 280 kaj entenas 28.000 paŝtistaj centroj. Sed ankaŭ, ke preskaŭ 3.000 parokoj estas sen paro-kestro, kaj havas ne konstantan religian asistadon. Ke ĉiuj sacerdotoj estas ĉirkaŭ 63.000, preskaŭ 14 por dek mil katolikoj; kaj ke la votintaj religiulinoj estas preskaŭ 150.000.

GRAVA KONTRIBUAĴO por la celebrego de la "Internacia Jaro de la libro" proklamita de UNESCO por ĉi tiu jaro, ek de la 9a de nov. 1970a, dum ĝia deksepa sesio, estas la biblia elmontro, kiun la Vatikana Biblio-

teko inaŭguris la 25an de marto en la Ksista salonego. Temas pri preskaŭ 150 valoregaj bibliaj raraĵoj el ĉiu tempo ekde la tria jarcento. Interalie oni povos tie admiri la plej antikvajn manuskriptojn de Qumran sur la Mortinta Maro, la faman 36-paĝan papiruson "Bodmer" kun la plej antikva teksto de sankta Petra letero; la faman Biblion de Guttemberg, la unuan presitan ekzemplon de la sankta libro, datiĝantan je la duono de la 1400a; la mondkonatan "Codex B" aŭ "Vaticanum"; la bibliojn ornamitajn por la imperia korto de Bizanco, kaj multajn miniaturajn kodojn. La elmontrado de la Biblio, la libro de la libroj, la daŭra "best-seller" en la mondo, estos la tutjara plej grava iniciato de la Vatikano, kiu antaŭvidas diversajn aliajn kontribuadojn, kiel alian elmontron de la "Poliglota presejo"; filatelian eldonon inspiritan el la Biblio; serion da elsendoj de la Vatikana radio; prelegojn, artikolojn; ktp. Oni apogos en la tuta katolika mondo bibliajn celebradojn, tagojn, apartajn kursojn, ktp. Oni zorgos por enkonduko de la biblio en la katolikajn lernejojn; por ĝia disvastigo kaj prezentado ĉe radio, televido, ĵurnaloj, ktp.; por belartaj konkursoj pri bibliaj temoj. Oni petos ankaŭ de la religiaj ordenoj kaj de la katolikaj eldonejoj, ke oni katalogu kaj raportu pri sia tuta presagado.

19 EROJ DE LA PAPIRUSOJ de Qumram, trovitaj en la '55a en kaverno ĉe la Morta Maro, estis decifritaj de P. O' Callaghan, jesuito de Barcelono. Du el ili entenas pecojn de la malnova Testamento; 17, pecojn de la evangelio laŭ Marko, nome tiujn, kiuj parolas pri Jesuo paŝanta sur akvo kaj pri la multigo de panoj kaj de fiŝoj. P. O' Callaghan deklaris, ke tiu decifrado permesas aserti kun sufiĉa certeco, ke la evangelio ne estas frukto de prilaboro de antikvaj kristanaj komunumoj, kiel iuj supozas, sed raporto el la epoko mem de Jesuo,

transdonita el senperaj fontoj. La rezultatoj de tiuj stu
doj okazigis diskutojn inter bibliistoj pri la datigo de la
papi^urusoj.

LA UNUA EKZEMPLERO de la volumo "Aktikveco de
la S. Seĝo en la 1871a estis transdonata al la papo per
la Stata Sekretario, kard. Villot, la 13an de marto. La
dika volumo, el 980 paĝoj entenas la plenan dokumenta
ron de la agado de la papo kaj de la S. Sidejaj kongre
gacioj dum la ĵus pasinta jaro. Troviĝas tie ankaŭ la re
feratoj pri la laboroj de la papaj komisionoj kaj de la
multaj oficejoj de la Kurio kaj de la Vatikana Ŝtato. La
libro atestas pri la vigla partopreno de Paŭlo VI en ĉi
uj problemoj de la eklezio kaj de la mondo. La merkre
daj aŭdiencoj, la paroladetoj antaŭ la Anĝeluso, la ad
monoj al apartaj grupoj de kredantoj, la leteroj al e
piskopoj, la mesaĝoj ĉe la plej diversaj okazaĵoj, doku
mentas kiel la papo estas atenta al ĉiuj eventoj de l' ho
maro. Sen paroli pri la privataj aŭdiencoj kun la plej
intimaj kunlaborantoj kaj kun la episkopoj el la tuta
mondo, kun kiuj li ĉiutage renkontiĝas, kaj pri kiuj o
ni nur povas imagi trans la laŭnoma listo, la pezon kaj
gravecon de la problemoj. La aktiveco de la sanktaj kon
gregacioj plenigas ĉirkaŭ 400 paĝojn. El tiuj indikoj oni
povas informiĝi, ke de la '69a jaro ĝis la 71a la kato
likoj kreskis je pli ol sep milionoj da animoj. La hel
poj donitaj de la kongregacio por la evangelizado de la
popoloj superis 33 milionojn da dolaroj, el kiuj 45 pro
centoj por Afriko, 38 p.c. por Azio, 8 p.c. por la su
da Ameriko kaj 5 p.c. por Eŭropo. La orientaj eklezi
oj ricevis 4 milionojn da dolaroj. La sentencoj de la S.
Roto estis 252: 169 pri nuleco de geedziĝo, 80 por
ĝi a valideco. Inter la psikaj nenormalaj statoj konside
ritaj de tiuj sentencoj, kiel malhelpintoj de libera kon
sento, estis skizofrenio, alkoholismo, sindrogado, mis

aligiteco al sia patrino.

LA INTENSA TAGO de la sankta Vendredo, kiu vidis la papon plenumi la liturgiajn ritojn en la baziliko S. Maria Maggiore, konkludiĝis per la dumnokta "ViaCru^{cis}", en kiu partoprenis ankoraŭfoje la papo, kiel li far^as jam de ok jaroj. Sennombra kosmopolita popolama^aso kunvenis ĉe la impona koloseo, sugestie lumigita, ĉe kiu antaŭ pli ol du jarcentoj la pia pilgrimado kun Jesuo naskiĝis en la koro de la franciskana apostolo S. Leonardo de Porto Mauzizio. Por reliefigi la diver^sajn lokojn en kiuj, kiel komento de la suferplena ira^ado de Jesuo, disvolviĝos la Krucvojo, sur kelkaj plej elstaraj monumentoj de la Palatina zono, tremetante flamis multaj karakterizaj romaj torĉoj. La papo ĉe^estis el podio ekde la komenco; kaj kiam la 10a "sta^ccio" alproksimiĝis al li, li mem prenis la krucon el la manoj de kard. Dall'Acqua kaj daŭrigis ĝis la fino la sanktan iradon. Fine, per parolado de la papo, kiun ni donas en la esperanta traduko je paĝ.74, kaj per lia beno konkludiĝis la emocia rito.

LA UNUA KATOLIKA PREĜEJO, post tiu, kiu estis starigita en la mezepoko, estos konstruita en Groen^lando ĉe vilaĝo Godthaab, kun la helpoj de la germaⁿna ĉefdiocezo de Kolonio. Groenlando havas nun 46.000 loĝantojn, plejparte luteranoj. La katolikoj es^tas nur 50, asistitaj de tri sacerdotoj.

OKAZE DE LA 1a TUTPOLLANDA RENKONTIĜO de Esperantistaj Veteranoj en la Kaŝuba vilaĝo Chmielⁿo apud Kartuzy en Norda Pollando, estis celebrita sankta meso en Esperanto. Pri tio skribis al ni s⁻ano Andrej Marŝalkowski, prez. de la Kaŝuba Filio de la Pola E. Asocio. Li raportis, ke post la saluto de pa⁻rokestro Alojzy Karol Porzinski, kiu sin diris hono⁻

rata pro la unua meso en Esperanto en Kaŝubio kaj en Vojevodio de Gdansk, la paroĝestro legis leteron de mons. Kazimierz Kowalski, episkopo de Pelplin, en kiu interalie, la prelato diras: "Mi estas konvinkita, ke la evoluo de la Esperanto-Movado povas kuntreni la spiritan alproksimiĝon de la nacioj, unuiĝon en Kristo Jesuo kaj firmigon de Dia paco". Celebris la meson, kun kantoj en la internacia lingvo, pastro Henriko Paruzel, prez. de la Pola Katolika Unuiĝo de Esperantistoj. "Esperanto -emfazis la celebranto- ne devas esti lingvo por si mem, sed ilo al spirita unuiĝo de la diaj infanoj kaj al disvastigo de la Bona Novaĵo tra la tuta mondo".

KUN BONVENA SALUTO la episkopo de Ausburg (Germanujo), mons. Stimpfle akceptis je la 24a de la ĵus pasinta februaro, grupon de 12 episkopoj, inter kiuj kelkaj reprezentantoj de la Vatikana sekretariato por unuiĝo de la kristanaro. Ilia kunveno ĉe la "Centro de Ekumena vivo" Ottmaring estis frukto de la persista laboro inter katolikoj kaj luteranoj por doni konkretan efektivigon al la ekumenaj celoj de la eklezio. La Ottmaringa Centro jam montras fakte kiel la Sankta Spirito laŭgrade malaperigas la jarcentan vundon el la vizaĝo de la kristana germana eklezio, okazinta pro la skismo de la XVI jarcento. La koro de la Ekumena Centro konsistas el kvindek da personoj entute dediĉitaj al la celo de la unueco. En tiu malgranda ekumena urbeto ekloĝis katolikaj familiaj nukleoj kaj komunumo de konsekritaj fraŭlinoj, apartenantaj al la evangelia konfesio. Kvankam ili havas apartajn liturgiajn servojn, laŭ propra kredo, tamen ĉiuj klopodas praktiki inter si la plej grandan amon kiel kristanan ateston, kaj kunlaborem pri diversaj ekumenaj iniciatoj. En la 1971a jaro okazis tie la unuan fojon komu-

na kongreso inter katolikoj kaj luteranoj sub la gvida do de la Aŭsburga episkopo. En tiu evento kuniĝis preĝe en la urbo preskaŭ 20.000 inter germanaj katolikoj kaj protestantoj. Iniciatinto de tiu ekumena organizo estis la Movado de la Fajrujoj. Kaj la organizado vekis tiel grandan favoron, ke jaron post jaro la aktiveco kapablis disvolvi pli kaj pli riĉan programon per "naciaj ekumenaj studsemajnoj" en kiuj partoprenas multaj sacerdotoj, pastoroj, teologiaj profesoroj kaj episkopoj.

VERE GRANDIOZA LA CELEBRADO de la Pasko en la protestanta monakejo de Taizé, en Francujo, kie kunvenis pli ol 15.000 junuloj el 40 nacioj. Post la paska meso, celebrita de juna sacerdoto el Togo, Roger Schutz, la prioro de la monakejo, anoncis, ke la tiel dirita "Koncilo de junuloj" tio estas, ilia plej granda religia asembleo, okazos somere de la 1974a. La anonco estis donita en la ĉeesto de kard. Koenig, ĉefep. de Vieno kaj prezidanto de la Sekretariato por la nekredantoj, de pastoro Carson Blake, ĝenerala sekretario de la ekumena Koncilio de la eklezioj, kaj de metropolito Timiadis, reprezentanto de patriarko Atenagoro ĉe la sama ekumena Koncilio. Roger Schutz memorigis ankaŭ la multajn iniciatojn enkondukitajn dum ĉi tiuj lastaj jaroj por organizi la anoncitan "Koncilion".

ORIGINALA ELMONTRO PRI savhistorio estis organizita en Yuen Long, ĉe Hongkongo. Ĝi estas artikigita laŭ ses etapoj helpe de elektronaparato por kontrolo de lumoj kaj sonoj, kiuj donas tridimensian aspekton de la priskribitaj rakontoj pri la homa historio. La ses sekcioj de la elmontro ilustras la kreadon, la originan pekon, la konstantan dian amon, montritan per la profetoj kaj per la veno de la Mesio, la dek diajn ordojn, la nuntempajn militojn, kaj la bedaŭrindajn sekvojn de la forpelo de Dio el la homa vivo.